



Bulgara **ESPERANTISTO**





* * *	Nia asocia organo	1
* * *	La 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno	3—6
	Humphrey Tonkin. Ne nur pri pretendoj, sed ankaŭ pri sukcesoj	7
	Eduard Tvarožek. Sola en sunsubiro	10
	Vesna Skaljer-Race. La maroj de l' homo	10
	Dmitrij Cibulevskij. SEJToj mortis — vivu SEJToj !	10
	Stasis Gajdamavičius. 15-jara jubileo de „Juneo“	11
	Violin Oljanov. La arto traduki	12
	A. Vaitilavičius. Floru la translima amikeco !	15
* * *	Doktoriga disertacio pri Esperanto	16
	Ljudmila Jevsejeva. Marieto	III
	Latva popola fabelo. La maldiligenta edzino	III
	Nekrologoj pri Ivan Dobrev kaj Damjan Krušev	II
	Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo :

La Internaciaj Esperanto-Kursoj por Instruistoj en Burgas, kiujn ĉi-jare (5-a ĝis 24-a de aŭgusto) partoprenis pli ol 200 gesperantistoj el 7 landoj



Redakta Komitato : Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GOROV, Aŝen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN Haim LEVI.

Korektis : Vasja Cvetkova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29



Fotoj :

La prezidanto de UEA H. Tonkin en konversacio kun prof. Gasto Waringhien — la prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA.

La Bulgara Esperanta Teatro en Ateno: sceno el la spektaklo „Lernejo de virinoj“ (vd. p. 5)

Membroj de la jurulara E-societo „Juneco“ en Vilnius (vd. p. 11)

**NIA ASOCIA ORGANO**

Malglata estas la historio de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Ĝi konas suprenirojn kaj falojn, floradon kaj velkadon. Estis momentoj kiam ĝi apenaŭ vegetis per kvar aŭ ok paĝoj en numero. Kaj ĉiam la eldonkvanto estis ne pli ol 2000. La monarkofaŝisma potenco rigardis malfavore nian revuon kaj fine — en 1942 — tute malpermesis ĝin.

La suno de la libero vigligis la Esperanto-movadon en nia lando, same ankaŭ ĝian organon. „Bulgara Esperantisto“ komencis efike ludi sian rolon de organizanto kaj edukanto de la esperantistoj en nia Popola Respubliko. Ĝi aktive helpas al Bulgara Esperantista Asocio solvi siajn taskojn. Spegulante la vivon de niaj E-societoj kaj distriktaj estraroj, „Bulgara Esperantisto“ luktas por realigo de la politiko de la Centra Estraro de BEA kaj ĝia Buroo. Per sia varia enhavo ĝi faras pozitivan ideedukan kaj kulturklerigan laboron inter la esperantistoj, mobilizas ilin por plenumo de la asociaj taskoj, same kiel ankaŭ de la tutpopolaj taskoj. Per publicistikaj kaj belartaj materialoj ĝi respondas al ĉiuj naciaj taskoj, celebroy de rimarkindaj datrevenoj, personoj ka. Preskaŭ en ĉiu numero estas materialo pri la batalo de la bulgaraj esperantistoj kontraŭ la faŝismo kaj monarkismo kaj nun — pri ilia konscia partopreno en la konstruado de socialisma socio en nia patrolando.

La publikigado de tradukoj el niaj verkistoj — klasikaj kaj nuntempaj — donas eblecon al eksterlandaj legantoj konatiĝi kun nia nacia literaturo, kun la heroaj bataloj de nia popolo por libero kaj socia justeco, kun niaj grandiozaj sukcesoj en la konstruado de nova, feliĉa vivo ĉe ni.

Samtempe „Bulgara Esperantisto“ regule havigas al siaj legantoj informojn pri la vivo de la esperantistoj en la frata Sovetunio kaj la ceteraj amikaj landoj de la socialisma tendaro. En ĝi trovas lokon ankaŭ materialoj pri ĉiuj pli gravaj iniciatoj kaj paŝoj de UEA, pri ĉiuj notindaj eventoj en la vivo de la monda E-movado.

Per sia tuta enhavo kaj per sia spirito „Bulgara Esperantisto“ estas konsekvenca batalanto kontraŭ la nigraj fortoj de la internacia reakcio, kontraŭ ĉiuspecaj agresemuloj kaj militinstigantoj, batalanto por la plej helaj idealoj de nia popolo kaj de la tuta homaro — internacia amikeco kaj kunlaborado, paco kaj socialismo.

Paralele kun ĉio ĉi „Bulgara Esperantisto“ kontribuas por plialtigo de la lingva nivelo de la esperantistoj. Tion ĝi faras ne nur per artikoloj pri teoriaj kaj praktikaj lingvaj demandoj, sed ankaŭ per sia Zamenhova lingva pureco kaj facila stilo.

Rezulte de ĉio ĉi la aŭtoritato kaj la populareco de „Bulgara Esperantisto“ konstante kreskas. Pri tio elokvente parolas ankaŭ la senĉesa pligrandiĝo de

ĝia eldonkvanto. En 1968 kaj 1969 j. ĝi aperadis en 3500, en 1970 superis 4000 kaj en 1973 — jam 5000. Dum la kuranta jaro la eldonkvanto de nia asocia organo atingis 6100 — la plej alta en ĝia tuta historio! Ŝajne neniu nacia E-organo en la mondo povas laŭdi sin pri simila sukceso. Ĝi estas rezulto de la sindona laboro de niaj aktivuloj, kelkaj el kiuj kolektis po 100—150 abonoj. Iliaj nomoj kaj fotoj merite okupis lokon sur nia honora Verda Tabulo. Bonege laboris ankaŭ la plimulto de la distriktaj kaj societaj estraroj. Ne havante informojn pri la societoj, ni ĉi tie mencias nur kelkajn distriktojn. Unuan lokon okupis Smoljan (649 abonantoj), malgraŭ ke ĝi estas unu el la malgrandaj distriktoj de nia lando. Kompare kun 1975 triobligis la nombron de la abonantoj: Haskovo (de 76 al 204), Razgrad (32—105), Târgoviște (29—90); duobligis la nombron Burgas (57—104), Varna (86—174), Pleven (68—163), Ruse (158—336), urbo Sofio (213—463), Stara Zagora (196—451). Tre bonan rezulton atingis Loveĉ (183—213), Pazarĝik (142—230), Plovdiv (206—357), Târnovo (267—268), Ŝumen (99—129), Vraca (132—184), Gabrovo (77—108). Kelkaj distriktoj, bedaŭrinde, iris malantaŭen — Vidin (27—26), Pernik (53—31), Silistra (32—18), Tolbuhin (25—17) aŭ faris nur etan progreson: Sofio (30—54), Miĥajlovgrad (25—26), Kârĝali (11—18). La Buroo de BEA kaj la redakcio varme dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis por la brila sukceso! La praktiko doni moralan kaj materialan rekompencan al tiuj, kiuj distingigas en la abonkampanjo de nia asocia organo, daŭros plu!

Ĝis nun tamen ĝia abonkotizo estis ridinde malalta — 1.40 levoj por 12 numeroj, kio kaŭzis perdojn al la Asocio. Havante antaŭvide tion la 39-a kongreso de BEA en Ruse unuanime decidis plialtigi ĝin al 2 levoj. Ni kredas, ke niaj distriktaj kaj societaj estraroj, niaj aktivuloj kaj multnombraj legantoj bone komprenos tiun paŝon kaj por 1977 j. ni perdos eĉ ne unu abonanton. Male — la abonantaro devas kreski plu. La bulgara E-movado okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo kaj ĝi havas fortojn eldoni sian organon eĉ en pli granda kvanto. Ĉio dependas de ni mem — de nia amo kaj fideleco al Esperanto kaj al nia kara E-organizaĵo, de nia konscia, sistema kaj obstina laboro.

Oni ne forgesu, ke ankaŭ ĉi-jare abono al „Bulgara Esperantisto“ estas ebla nur pere de la poŝto ĝis la 30-a de novembro.

Responde al la nova sukceso la redakcio montros ankoraŭ pli da zorgoj por plua varligo kaj plibonigo de nia organo.

Al energia, obstina kaj laŭplana laboro por atingi ankaŭ nun 6100 abonantojn!

KARAJ GESAMIDEANOJ!

La Semajno de Internacia Amikeco jam fariĝis tradicio en la vivo de la esperantistoj. En 1977 ĝi okazos inter la 20-a ĝis la 26-a de februaro.

Ni atentigas: ekde nun planu kaj komencu prepari iniciatojn por la Semajno, kies pretigo postulas pri longan tempon, kunordigon kun aliaj organizoj, institucioj kaj personoj ekz. presigi afiŝon kun teksto nacilingva kaj la emblemo de la Semajno, kontakti Esperanto-grupon en ĝemela urbo kaj kune kun ĝi efektivigi iujn iniciatojn inkluzive interŝanĝon de salutleteroj inter la urbestroj de tiuj ĉi urboj (prefere en Esperanto), prepari por la gazetaro kaj radio bultenon aŭ artikolojn pri la Semajno kaj pri Esperanto kiel taŭga ilo de la internacia amikeco ktp.





31. 7 — 7. 8. 1976

LA MALFERMO

Por partopreni la 61-an UK en la antikva Ateno kolektiĝis ĉ. 1350 esperantistoj el 51 landoj de ĉiuj kontinentoj. El Bulgario venis ĉ. 250.

„Ni kongresas la unuan fojon en Ateno. Ni kongresas la unuan fojon en Grekujo. La juna kulturo de la Internacia Lingvo salutas la antikvan kulturon de la grekoj. En la stratoj, kie promenis Sokrato, Platono, Eshilo, Sofoklo, Aristofano, aŭdiĝas la Internacia Lingvo Esperanto.“ Tio estis la unuaj vortoj de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, ĉe la komenciĝo de la solena inaŭguro de la Kongreso en la impona festsalono de la moderna atena hotelo „Hilton“ dimanĉe, la 1-an de aŭgusto. Post liaj salutvortoj bonvenigis la kongresarojn ankaŭ s-ro G. Miggas — la prezidanto de LKK.

La Kongreso estis salutita de oficialaj reprezentantoj de la greka registaro: s-ro Panajotopulos — visministro de komerco, kaj s-ro Papateodoru — ĉefurbestro de Ateno.

Sekvis prezento de la kongresa ĉeftemo — „Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo“, fare de d-ro Werner Bormann — vicprezidanto de UEA. Notinte la realan ekziston de kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo en la nuntempo, ekz. la Organizaĵo de Afrika Unueco, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la Eŭropa Konsilantaro (en okcidenta Eŭropo), la Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpe (en orienta Eŭropo) k. a., d-ro Bormann atentigis pri la netaŭgeco de la ĝisnuna konvencia vojo („laborlingvoj“ — konstante uzataj, kaj „oficialaj lingvoj“ — malofte aŭ tute ne uzataj) kaj substrekis la neceson solvi la problemon pere de la vere neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto.

D-ro Tonkin legis kelkajn el la skribaj mesaĝoj al la Kongreso, i. a. la mesaĝon de la ĝenerala direktoro de Unesko Amaçou Mahtar M'Bow (Bou), kiu interalie skribis: „Kiel interŝtata organizaĵo kun 136 suverenaj ŝtatoj membroj, Unesko plene konscias pri la problemoj de komunikado kaj interkompreniĝo,

kiujn kaŭzas la multeco de la lingvoj uzataj tra la mondo, kaj konscias same pri la kultura riĉo, kiun ili prezentas.

La grandaj celoj de Universala Esperanto-Asocio rilate la faciligon de internaciaj intelektaj interŝanĝoj por pli bona kompreno inter la popoloj respondas al tiuj de Unesko. Estis do nature, ke establiĝu inter la du organizaĵoj amikaj rilatoj, kiujn konfirmis formala interkonsento, stariganta konsultajn kaj informajn rilatojn. Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plue plifortiĝos en la venontaj jaroj.“

Sekvis la salutoj de la diplomaciaj reprezentantoj. En la romo de la ministro de eksteraj aferoj de PR Bulgario salutis la Kongreson k-do Ivan Nikolov — aferŝarĝito ĉe la bulgara ambasado en Ateno.

La solena inaŭguro finiĝis per kelkaj vortoj de la prezidanto de UEA, direktitaj ĉefe al la ĉeestantaj gastoj-neesperantistoj. I. a. li diris: „Ni estas por lernado de fremdaj lingvoj. Sed la rezulto preskaŭ ĉiam estas, ke la lerninto parolas neplenan lingvon, balbutas, estas parole kripla. Por internacia uzado Esperanto, pro siaj facileco kaj flekseblo, estas pli natura ol ĉia lernado de fremdaj lingvoj, pli plena ol ĉiuj aliaj rimedoj de interkontaktiĝo inter la homoj.“

Ankaŭ la oficiala malfermo de la Kongreso, dimanĉe posttagmeze, okazis en la salono de hotelo „Hilton“. Salutparoladojn faris la reprezentantoj de 29 aliĝintaj al UEA landaj asocioj kaj 6 nealiĝintaj, 2 el landoj kun neorganizita E-movado kaj fine reprezentanto de la gastiganta lando — entute 38 landoj de ĉiuj kontinentoj. En la nomo de la Bulgara Esperantista Asocio salutis la Kongreson ĝia prezidanto k-do Ĥristo Gorov.

La dua parto de la malfermo konsistis el longa parolado de la prezidanto de UEA, kiun ni donas aliloke.

La solenaĵo finiĝis per komuna kantado de la himno, gvidita de bulgara koruso el u. Târgoviște.

KOMITATKUNSIDOJ

Multaj komisionoj kaj laborgrupoj, kiuj funkciis dum la tuta jaro, bone helpis la laboron de la Komitato kaj la Estraron de UEA, trastudinte anticipe kaj profunde multajn problemojn. Tio estas esence grava momento en la nova laborstilo de UEA. Ĝuste tiuj komisionoj kaj laborgrupoj ŝanĝis la laboron tiel, ke nun la tutmonda esperantistaro havas tre efikan Komitaton kaj dinamisman Asocion. Ankaŭ pli frue ekzistis komisionoj, sed ili ĉefe estis dumkongresaj grupiĝoj de komitatanoj, kiuj, neinformitaj kaj nepreparitaj por la taskoj, malgraŭ sia tuta bonvolo, ne povis tre fruktoĉone labori.

En Ateno okazis sep kunsidoj de la Komitato kaj pluraj kunsidoj de la diversaj komitatkomisionoj. Estis traktitaj kaj solvitaj mul-

tego de demandoj, inter kiuj aparte elstaris la financaj. Estis aprobita la Financa Programo de la E-movado. Estis solvita ankaŭ la tikla demando pri la kontoj de la 58-a UK en Beogrado, kiu jam tri jarojn pezis super la rilatoj inter UEA kaj Jugoslavia E-Ligo: la disputita sumo el 6 000 gld. fariĝos bazo de speciala fonduso, kiun oni uzos ekskluzive por progresigi la Movadon en la evolulandoj de la t. n. Tria Mondo.

Grava momento en la komitatlaboro estis la akcepto de tri novaj landaj asocioj: de GDR, Slovakio kaj Suda Koreujo.

Oni traktis ankaŭ vicon da aliaj demandoj: pri la nova Statuto, CED, landa kaj faka agado, kulturo, informado k. a.

En ĉiuj komitatkunsidoj regis atmosfero de kompetenteco kaj rapidago, de toleremo kaj interkomprenemo.

ĜENERALAJ KUNVENOJ DE UEA

Okazis du ĝeneralaj kunvenoj de UEA. En la unua, laŭ prezento de la ĝenerala sekretario s-ro Wensing, oni traktis la raporton de la Estraro pri la ĝisnuna agado. Estis faritaj multaj rekomendoj por plibonigo de la agado: pri aparta membrokotizo por ĝejnuloj, kiu ne superu 10 gld., pri financoj ĝenerale, pri la institucio Hodler, libroeldonado, eventuala translokiĝo de CO de UEA k. a.

La dua ĝenerala kunveno tradicie estis dediĉita al la kongresa ĉeftemo. Post vigla, detala kaj sufiĉe longa podia diskutado, kiun partoprenis Claude Nourmont, G. Leon-Smith, H. Tonkin, Renato Corsetti, Rudi Graetz kaj Helmar Franc, kaj post parolado de H. Tonkin pri la rilatoj de la E-movado al la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, oni akceptis specialan rezolucion (ni donas ĝin aparte).

FAKAJ KUNVENOJ

Enkadre de UK okazis vico da kunvenoj fakaj kaj laŭ interesoj: de veteranoj, sciencistoj, pachtalantoj, fervojistoj, poŝtistoj, juristoj, muzikistoj, medicinistoj, matematikistoj, instruistoj, kristanoj, budhanoj, militrezistantoj, ŝakludistoj, radio-amatoroj, skoltoj, aŭtomobilistoj, rotarianoj k. a.

Okazis kunvenoj ankaŭ de respondeculoj de landaj E-asocioj, de delegitoj de UEA, virinoj, junuloj, redaktoroj, kunveno pri la Institucio Hodler, pri la laboro de CED, pri la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj, la hommedia programo de UN, agado ĉe politikaj partioj, agado de Eŭropa E-Centro, Eŭropa Klubo k. a.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU)

En ISU sub la rektoreco de la bulgara profesoro Vasil Peevski estis faritaj 15 prelegoj — do, pli multaj ol ordinare. La publiko mont-

tris grandan interesigon pri ISU eble pro la varieco de la traktitaj temoj. Jen la titoloj kaj la prelegintoj: „Esperanto kaj lingvistiko“ — 4 prelegoj (morfologio, fonetiko, sintakso, leksiko kaj semantiko) — d-ro John Wels, „Lingvo kaj Kulturo“ — William Auld, „La teatra parolformo“ — Belka Beleva, „Integriĝo de kulturpolitiko en nur ekonomian integriĝon“ — d-ro Werner Bormann, „La terminoj de alparolo kiel socilingvistika problemoj“ — Michel Duc Goninaz, „Kibernetiko kaj homa lernado“ — proj. Helmar Frank, „Originoj de la vivo“ — prof. Sin'itiro Kawamura, „Lingvo kaj identeco“ — d-ro Jonathan Pool, „Kiel kelkfoje maraj maluskoj fariĝas venenaj“ — prof. Carl Stop-Bowitz; „La pozicio de la islanda literaturo en la literatura mondo“ — Baldur Ragnarson, „Grekaj popolaj kantoj en la traduko serba“ — d-ro Miodrag Stojanoviĉ, „Generala superrigardo je la vitaminoj“ — prof. Alois Wenclevski.

Pri kelkaj el la supraj temoj estis organizitaj ankaŭ seminarioj.

PODIA DISKUTO: „KIEL NUNTEMPE ARGUMENTI PRI ESPERANTO“

Tiu aranĝo renkontis viglan interesigon ĉe la publiko, kiu amase venis al salono „Grabowski“. Sub la gvido de St. Swistak teamo de konataj esperantistoj prilumis la temon. Ĝi konsistis el D. Blanke (GDR), Fr. Luin (Sved), S. Kawamura (Jap), Swistak (Pol), Auld (Brit), Wels (Brit) kaj Minnaja (It).

La ĉeestantoj ricevis la novan folion pri „Fundamenta Principaro en Informado pri la Internacia lingvo“, t. e. la Principaron de Frostavalen, kaj kelkajn antaŭjuĝojn pri Esperanto. Tiun liston pri antaŭjuĝoj la podia grupo poste sekvis. Ĉe la diskutado la ĉeestantoj montris tian aktivecon, ke pro la limigita tempo oni sukcesis pridiskuti funde nur 4—5 el la deko de la prezentitaj antaŭjuĝoj. Vere tiu formo — la podia diskuto — montriĝis tre trafa, kaj oni devus apliki ĝin ankaŭ estonte rilate aliajn temojn.

En la sekvaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“ ni klopodos konigi konkrete la enhavon de tiu ĉi podia diskuto pri tiel gravega, baza temo de la E-movado.

SCI-KONKURSO „POR KE VI SCIU...“

Tiu ĉi aranĝo estis io nova en UK kaj tre interesa, alloga por la publiko. Ĝi okazis en tri partoj sub la sprita kaj eleganta gvido de s-ro W. Auld.

Teamoj konsistantaj el personoj aparte sciplenaj konkursis inter si pri Esperanto, ĝia historio, movado, lingvistiko, literaturo ktp. S-ro Auld donis la demandojn kaj ĉiu teamo klopodis respondi la unua. Se post kelkaj sekundoj neniu el la du teamoj respondis, tiam la parolon havis la publiko.



La teamoj venkintaj en la unuaj du partoj renkontiĝis en la tria parto kaj konkursis inter si. Fine venkis la teamo de C. Minnaja, A. de Giorgi kaj N. Salvesen.

La konkurso „Por ke vi sciuj...“ vere atingis sian celon: „altigi la scion de la kongresanoj pri Esperanto“. Ĉar ĝi estis unu el la plej bone vizitataj kongresaj aranĝoj kaj plezurige streĉa.

ARTAJ AKTIVECOJ

LA TEATRA VESPERO okazis en la teatro „Lusitania“. La Bulgara Esperanto-Teatro prezentis la komedion „Lernejo de virinoj“ de la franca klasikulo Molière (1622—1673). La spektaklo estis unu el la plej belaj, kiujn oni vidis ĝis nun en la universalaj kongresoj de Esperanto: bonega ludo de la artistoj, bona lingvaĵo, bona prononco — flua, klara. „Lernejo de virinoj“ estas la plej alta pinto de nia BET.

LA INTERNACIA ARTA VESPERO same okazis en „Lusitania“. La tutan programon gvidis majstre W. Auld en skota nacia kostumo.

En la unua — muzika — parto sin prezentis la anglino Margaret Hill kaj kvar gebulgarioj: Maria Angelova, Jordan Karagjozov, Mišo Zdravev, Veselin Damjanov. Aparte elstaris V. Damjanov, kies atena prezentiĝo estis lia plej granda sukceso ĝis nun. Li vere kaptis la publikon per sia potenca, emocia baritono, per sia profunda lirikismo kaj alt-nivela artismo.

La bulgara aktorino Belka Beleva tre sukcese ligis la du partojn de la vespero. Ŝi potence kaj tragike prezentis monologon de Medea el la samnoma dramo de Eŭripido.

La dua parto de la vespero estis omaĝo al Kolomano Kalocsay. La programo konsistis el recitaĵoj kaj kantoj — originalaj kaj tradukitaj de Kalocsay.

LA GREKA VESPERO, t. e. la vespero, en kiu la gastiganta lando sin prezentis, okazis en liberaera amfiteatro sub Akropolo rekte sub la aŭgusta atena ĉielo. La programo konsistis el diversaj grekaj dancoj kaj kantoj, kunordigitaj de la fama ĥoreografin Dora Stratu. Oni vidis dancojn el Makedonio, Ipiros, Dodekaniso, Pontos, Kato-Panaja (Malgranda Azio) kaj Rumeli-Morias. Ĉio estis prezentita kun profesia virtuozezo de plej altarango. Neforgeseblaj restas ankaŭ la buntaj, pitoreskaj popolkostumoj.

La Greka Vespero estis unu el la plej placaj kongresaranĝoj en Ateno.

Anstataŭ la enprogramita prezento de la Bulgara Pupteatro de Sliven, kiu ne sukcesis alveni, estis improvizita eksterprograma ARTA VESPERO. En ĝia unua parto prezentiĝis la japana dancistino Rie Anzai kun japanaj dancoj.

En la dua parto de tiu vespero sin prezentis

BULGARA KORUSO el u. Târgoviște. Sub la gvido de Kosta Petrov ĝi majstre plenumis bulgarajn kaj grekajn melodiojn, plurajn el ili en Esperanto. La ĉeestantaro aparte tondre kaj entuziasme respondis. La duonhoru de tiu koruso estis la senduba arta pinto de la tuta Kongreso en Ateno, kvankam ĝi koncertis en ekstreme malkonvena ejo, en kiu mankis eĉ fortepiano. Multaj el la publiko supozis, ke la prezento de tiu koruso estas nur antaŭanonco de ĝia tutvespera koncerto en Varna post du jaroj.

TRIKSINI — SPEKTAKLO „MIRIGAĴOJ EL KVIN KONTINENTOJ“

La spektaklo de la esperantisto-magiisto Triksini el Luksemburgo, „la magiisto kun la blua ŝtono“, vekis ekskluzive grandan intereson. Pli ol 300 ĉeestantoj kolektiĝis por ĝui lian arton. Kun mirinda perfekteco li mistifikis la publikon per aro da sekreteplenaj sorĉiloj.

BELARTAJ KONKURSOJ

Eniris la Konkursojn ĉi-jare entute 61 eroj, el kiuj 27 poemoj, 26 prozaĵoj, 3 drametoj kaj 5 eseoj de 31 aŭtoroj el 14 landoj. La rezultoj estis jenaj:

POEZIO: 1. **Eduard V. Tvarožek** (Ĉeĥoslovakio) por „Sola en sunsubiro“; 2. egale al **Albert Goodheir** (Skoŝlando) por „Printempaj strofoj“ kaj **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por „La manoj de la homo“; 3. **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por „Turniĝas la rado de l'istorio“.

PROZO: 1. **Endre Tóth** (Hungario) por „Lappar, la Antikristo“; 2. **Endre Tóth** (Hungario) por „La murdita juglandarbo“; 3. **Karolo Piĉ** (Ĉeĥoslovakio) por „Ne lasu min ĉi tie, patro“.

La premio „Luigi Minnaja“ por originala eseo: **Karolo Piĉ** (Ĉeĥoslovakio) por „La interna sistemo de Esperanto“.

DRAMO: 1. Ne aljuĝita. 2. Ne aljuĝita. 3. **Alexander R. Mollison** (Skoŝlando) por „Kongres-hotelo“.

PREMIO HARABAĜIU por: **NOVA TALENTO, Bernard Golden** (Hungario) por „Tropika festeno“.

FOTOGRAFIO: Konkursis 13 aŭtoroj per 46 fotografaĵoj; la premioj estis jene disdividitaj: 1. **Zoltán Fejér** (Hungario) por foto de K. Kalocsay. 2. **Bernard Golden** (Hungario) por la fotografaĵo „Daniel kaj la leonoj“. 3. **Leila Kantonen** (Finnlando) por foto sen titolo. Laŭda mencio: **Zoltán Fejér** (Hungario) por la foto „Infanoj“.

PRIORITATO AL LA ORIGINALA LITERATURO

Por unua fojo nur verkoj originale verkitaj en Esperanto estis akceptataj ĉe la Konkursoj.

Post la Kopenhaga Kongreso la Komisiono pri la Belartaj Konkursoj anoncis, ke provizore estas forigataj la tradukaj branĉoj de la konkursoj pro la longe spertitaj praktikaj malfacilaĵoj por justa prijuĝo de verkoj tradukitaj el lingvoj ne konataj de la komisionanoj. Fakte, el la tri tradukaj branĉoj — poezio, prozo kaj teatraĵo — nur unu — la poezio — efektive funkciis en la pasinteco. Tiu decido signifas, ke la branĉoj originalliteraturaj: originala poezio, originala prozo kaj originala dramo ricevas rangon ekskluzivan, kiel estas kutime ĉe similaj konkursoj nacilingvaj.

Lige al tiu ĉi optimisme fidema emfazo sur la originalliteraturon estis anoncita por tiu ĉi jaro nova branĉo de originala eseo sub aparta titolo: **Premio Luigi Minnaja**. Laŭ interkonsento kun la familio Minnaja (Italio), kiu donacis la kapitalon por la premio, temu pri eseoj lingvaj, literaturaj aŭ sociologiaj, prefere en ligo kun Esperanto kaj ĝia uzado. Estas bonaŭgure, ke la unuajaraj konkursaĵoj en tiu ĉi nova branĉo estas ĝenerale de alta kvalito, kio pruvas, ke oni rigardas tiun novan konkurseblecon kun bonveniga seriozo.

Estas interese rimarki, ke la nombro de poeziaj kaj precipe novelaj konkursaĵoj por tiu ĉi jaro estas konsiderinde pli alta ol ĉe la originalaj branĉoj lastjare. Ankaŭ la kvalito estas ĝenerale pli bona, precipe en la prozo.

Laŭ Baldur Ragnarson

ALIAJ KONGRESARANĜOJ

Tradicie okazis interkona vespero, kongresbalo, bankedo (por aparte pagintaj), akcepto por la membroj de E-Societo „Zamenhof“, specialaj akceptoj en la Ministerio de Civilizo kaj fare de la urbestro de Ateno. Estis aranĝitaj ankaŭ filmprezentoj, seminario pri Ĉemeto, internacia ekzameno, konversacia rondo (4-foje — por nespertaj parolantoj de Esperanto).

Okazis ankaŭ kelkaj ekskursoj (por pagin-

toj): duontagaj — unu tra Ateno kaj Alia ĝis la kabo de Sunion kaj la Templo de Pozidono, tuttagaj — al la regiono Argolis (Korinto, Miceno, Naŭplino) kaj al la Delfo kaj tuttaga krosado al la insuloj de la Saron Golfo (Egina, Poros, Idra).

LA SOLENA FERMO

Tio estis impona solenaĵo, kiun ĉeestis preskaŭ la tuta kongresanaro. La vicprezidanto de UEA d-ro Borman sumigis la rezultojn de la kongresa laboro. La tri kongresajn rezoluciojn legis s-ino Szabo-Felső. S-ro B. Ragnarson anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj de UEA.

Nova evento estis la aljuĝo de la Pokalo Fyne al la plej sukcesa landa asocio de UEA en 1975 j. La prezidanto Tonkin enmanigis la pokalon al la Sveda E-Federacio pro ekzempla informlaboro pri Esperanto kaj precipe pro malavara apogo al la Societo „Zamenhof“. S-ro B. Ragnarson, prezidanto de LKK en Rejkjavik, transprenis la verdan flagon el la manoj de la atena prezidanto de LKK s-ro Migas.

Novaĵo en la solena fermo estis ankaŭ la fakto, ke post la tradicia kantado de „La Espero“ kaj adiaŭa aplaŭdo sekvis agrabla momento: akcepto por ĉiuj kongresanoj, dum kiu ili havis eblecon interŝanĝi lastajn salutojn ĉe glaso da refreŝiga trinkaĵo.

Tiel harmonie finiĝis, same kiel harmonie tutsemajne pasis, la 61-a UK de Esperanto. La partoprenantoj en ĝi ĉiame memoros kaj ĝin, kaj la blankan Atenon, kaj la belan Greklandon, kaj la gastaman, afablan grekan popolon. La Kongreso sendube estas nova mejloŝtono survoje al plua unuigo de la esperantistoj en unu aŭtoritata kaj reprezenta organizaĵo, kia estas UEA, survoje al nova vigligo kaj modernigo de la E-movado, survoje al novaj venkoj de Esperanto en la apartaj landoj kaj en la tuta mondo.

KONGRESA REZOLUCIO 1

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1976 kaj diskutinte kiel ĉeftemon «La internacian kunlaboron de ŝtatoj je regiona nivelo»,

notas

1. La kreskantan kaj salutindan kunlaboron inter ŝtatoj en samaj geografiaj regionoj;

2. La ofte esprimitan deziron de la ŝtatoj en samaj regionoj evoluigi siajn interrilatojn per pacaj rimedoj kaj en harmonia kunlaboro, anstataŭ per konfrontiĝo kaj malamikeco;

3. La antaŭvideblan intensiĝon de tiuj regionaj interrilatoj en la estonteco;

atentigas

1. Ke esenca elemento en la ĝusta kaj justa rilatado de la ŝtatoj estas egaleco de lingvoj, kiel nun penas apliki certaj internaciaj regionaj organizoj;

2. Ke tiu lingva egaleco estas tre multekosta kaj neefika, se ĝi ne estas atingata per punta lingvo, kiu neŭtrale ligu la diversajn ŝtatojn-membrojn;

3. Ke la neŭtrala kaj esprimkapabla Internacia Lingvo Esperanto reprezentas idealan tian pontan lingvon, taŭgan por oficiala utiligo en internaciaj organizoj;

4. Ke Esperanto, pro sia facila lernebleco,



Parolado de la prezidanto de UEA d-ro H. Torkin je la fino de la [malfermo [de la 61-a UK (mallongigita)

Pasintjare mi raportis al vi precipe pri promesoj kaj esperoj. La situacio de nia Asocio kaj de la Esperanto-movado, kiu ĉirkaŭas ĝin, signife ŝarĝiĝis inter Kopenhago kaj Ateroj. Ĉi-jare eblas paroli ne nur pri estonteco, sed pri jamaj solidaj atingoj, ne nur pri pretendoj, sed ankaŭ pri sukcesoj. Mi ne volas sugesti, ke ĉiuj niaj problemoj malaperis kvazaŭ miraklo (iasence, la veraj problemoj nun komenciĝas), sed ke la ĝenerala strategio de UEA en la nuna tempo ŝajnas esti prava kaj komencas alporti fruktojn.

Tiu strategio enhavas tri ĉefajn elementojn: unue, plifortigi kaj plialtigi la internan funkciadon de la Asocio; due, sisteme labori por unuecigi la Esperanto-movadon en spirito de toleremo kaj kunlaboremo; kaj, trie, pli klare kaj emfaze prezenti Esperanton al la ekstera mondo.

Nia membraro estas nun bone informita pri la agado kaj planoj de la Asocio. Bone informita membraro estas membraro enplektita en la aferojn de la Asocio — kiu sentas respondecon pri la Asocio. UEA ja ne estas, aŭ ne devus esti, senpersoneca, senvizaĝa burokratio. Ĝi estas vivanta organizo el vivantaj homoj, kaj ĝia ĉefa ekzistokialo estas fari ŝarĝon, fundamentan ŝarĝon, en la internacia socio sur la lingva kampo. Ni ne estas, aŭ ne devus esti, organizo en rutino, sed organizo en kampanjo.

Tion ŝajne kompreras niaj membroj. Viaj lojaleco kaj subteno komencis transformi nian asocion en la pasintaj monatoj. Por mi persone, kiel por multaj miaj kolegoj, la plej inspira evoluo de la jaro estis la eksterordinara nivelo de kunlaboremo, helpemo, komprenemo, kiu elversigis al UEA. Ĝi unue manifestiĝis en Kopenhago: etoso unike harmonia refreŝigis niajn animojn kaj donis al ni senton de direkto kaj konscion de celo. Estis ne nur plaĉe, sed ĝojige esti esperantisto — spirito rara, sed rekaptita. Tiu spirito aperis ankaŭ en la Volontula Servo. Kiam la Estraro akceptis la proponon starigi Volontulan Servon, en kiu niaj aroj, plejparte junaj, laboru flankalflanke kun profesiuloj, precipe en la Centra Oficejo, ni ne estis plene konvinkitaj pri ĝia sukceso. Sed ni sublaksis la spiriton de niaj membroj. La sukceso de la

Volontula Servo estas la ĉefa nova faktoro, kiu ebligis la kelkrilate okulfrapan retrovon de nia financa kaj administra ekvilibro. Deficito de 60 000 guldenoj en 1973 fariĝis gajno de 26 000 guldenoj en 1975. La kapitalo kreskis je 26 procentoj. Kaj por 1976 ne necesas altigi la kotizojn kaj fariĝis ebla haltigi la perdon de membroj.

Ankaŭ la donacoj al la Asocio — bona indikilo pri la animstato de la membraro — montris eksterordinaran kreskon. Dum en 1973 la donacoj al la Ĝenerala Kaso sumis je proksimume 1500 guldenoj, ĝis 1975 ili okobliĝis, tiel ke en tiu ĉi jaro ili atingis preskaŭ 13 000 guldenojn. Se oni konsideras, ke la donacoj al la Ĝenerala Kaso estas ĉiam relative malgrandaj (la vere grandaj fluas rekte en la kapitalan konton), oni tuj vidas, ke multiĝis ne nur la guldenoj, sed ankaŭ la donacantoj. La Societo Zamenhof, starigita antaŭ du jaroj, logis iom pli ol 170 membrojn en la tuta 1975. Kaj por la nuna jaro la membraro de la Societo jam atingis la nombron 200.

La frapaj kreskoj en donacoj ne inkluzivas la jamajn donacojn al la Financa Programo de la Esperanto-movado, kiu, ĉefe dank' al la eksterordinara malavareco de unu anonimulo — doninta al ni kvazaŭ per unu bato la bazon por tiu kvanta kresko de nia agado, kiu tiel necesas — jam atingis preskaŭ 60 000 guldenojn. Parton de tiu sumo ni reinvestos en la Programo mem, tiel donante al ni la rimedojn por sisteme serĉi financadon ekster la Esperanto-movado. Eĉ la plej bonaj ideoj perdiĝas, se iliaj adeptoj ne scias, kiel prezenti ilin al la mondo. En la moderna mondo de tumulta politiko, amasmedioj, internacia komerco, fulmrapidaj komunikiloj, la enpenetro de Esperanto postulas grandajn rimedojn. Tio estas eĉ pli evidenta, se oni konsideras, ke la ideo de Esperanto ne estas ĝenerale akceptita — ke necesas ne nur alporti Esperanton al la homoj, sed konvinki ilin. Nia idealo realiĝos nur tiam, kiam ni sukcesos esti ne nur aŭskultataj, sed ankaŭ respektataj, ne nur pledi antaŭ la homoj, sed efektive gvidi la homojn al solvo de la lingva demando. Kaj tiu celo ne estas nerealisma: ĝi ne superas niajn kapablojn. Tion abunde pravas la eksterordinara vivkapablo de nia Esperanto-movado kaj, plej lastatempe, la

ankaŭ aparte bone taŭgas por senpera kontakto inter la ordinaraĵoj de najbaraj landoj;

kaj alvokas

1. Al la diversaj internaciaj regionaj organizoj, ke ili studu la eblecon utiligi Esperanton kiel lingvon de dokumentado kaj eventuale lingvon de administrado kaj debato, kaj ke ili antaŭenigu ĝian utiligon en la propraj regionoj;

2. Al la diversaj ŝtatoj, ke ili antaŭenigu la instruadon kaj utiligadon de Esperanto por ĉiaj homaj kontaktoj inter lingvaj grupoj el la koncernaj regionoj;

3. Al la regionaj organizoj kaj la unuopaj ŝtatoj, ke ili komune realigu la jam ekzistantajn interkonsentojn, kiuj celas faciligi la homan kontaktadon trans naciaj limoj kaj la reduktion aŭ eliminon de lingvaj baroj aŭ lingva diskriminacio.



eksterordinara apogo, kiun donas al UEA ĝia membraro.

Kaj, ke nia kulturo floras, tion pruvas simpla konstato de faktoj. Kvankam neniu povas esti kontenta ĉe kampo tiel neelĉerpeble granda, ni povas konstati kuraĝigan multiĝon de Esperanto-eventoj, eldonaĵoj, literaturaj konkursoj, scienca utiligo de la lingvo. La revuo «Scienca Mondo» ekaperis en Esperanto, la Someraj Universitataj Kursoj floras, sentebla fortiĝo en la universitata interesiĝo pri Esperanto okazis ekzemple en Budapeŝto kaj Paderborn; la Kultura Centro Esperantista en Svislando, eldona aktiveco en Japanujo, universitata agado en Sudameriko, lernejaj eksperimentoj en Eŭropo kaj Afriko — ĉio ĉi implicas, ke Esperanto vivas, floras kaj fortiĝas. En kelkaj landoj lastatempe ni rimarkis rapidiĝon de la rilimo — en la parlamenta agado, informado, kulturo. La estonteco de la Internacia Lingvo dependas ne de unu homo aŭ grupo de homoj, ne de estraro aŭ de komitato, aŭ eĉ de unu asocio. Se oni jam tion konstatis, oni konstatu nun, ke la Esperantomovado enradikiĝis en la kulturan vivon de nia mondo: ĝi estas nedetruibla, firma, konstanta — kaj mankoj ĉe UEA, malfruiĝo de la revuo, misoj ĉe universalaj kongresoj, povas ĝeni ĝin, sed ne detrui ĝin. La tasko de niaj organizoj (krom eviti tiujn misojn. . .) estas kunordigi, nutri kaj kultivi la talentojn de la esperantistoj laŭ sukcesa vojo — ne dikti, sed persvadi, ne dekreti, sed instigi.

El tiu konstato kreskis la dua elemento en la strategio de UEA — unuecigo de la Movado. Ĝi havas du aspektojn: forigon de superflujaj malakordoj, kaj krakon de aktiva kunlaboro. La malakordoj inter UEA kaj kelkaj Esperanto-asocioj (fenomeno pli-malpli konstanta dum multaj jaroj) eliminiĝas. Kun la Instruista Ligo, ekzemple, ni lastatempe denove starigis kunlaboron, tiel ke la vojo estas nun malfermita al ellaboro de plena kaj ampleksa programo por la instruado de Esperanto — programo, kiu inkluzivu ne nur la lernejan instruadon (kampo de la Instruista Ligo), sed ankaŭ la neformalan, en klubaj kursoj ktp; kaj kiu inkluzivu ankaŭ programon de kunlaboro inter la Ligo kaj UEA sur la tereno de eksteraj rilatoj — la rilatoj kun registaroj kaj edukaj instancoj. Tiu afero estos unu el niaj ĉefaj prioritatoj dum la venontaj monatoj.

Ni vastigis nian kontaktadon kun la landaj kaj fakaj asocioj. Plurajn novajn ni povis akcepti en la sinon de UEA. Kvankam niajn rilatojn kun landaj asocioj regas la preskriboj de la Statuto de la Asocio, principe ni opinias, ke la universaleco de UEA, la proksima kunlaboro kun ĉiuj esperantistoj diktas kiel eble plej grandan vastigon de la Asocio por enpreni la diversajn landajn movadojn, ke tio eblas sur la bazo de, interalie, la politika neŭtraleco.

Sed, karaj gekolegoj, estas foje malfacile

esti esperantisto. Ni laboras kontraŭ jarmiloj de senscio, ni klopodas akceptigi ideon tiel grandan, ke ĝi ŝajnas preskaŭ timiga al la ekstera mondo. La progreso estas malrapida, pena, laborpostula. De tempo al tempo homoj laciĝas pri tiu giganta tasko. Estante homoj, ili emas vidi en malrapida progreso ne la malfacilaĵojn de la tasko, sed la mankojn, eĉ la sabotadojn, de aliaj. Ili emas flari komplotojn kie ili ne ekzistas, bojkotojn kie ili ne troviĝas, cenzuradon kie ekzistas nur bona volo. En Kopenhago mi alvokis al kelkaj tiaj homoj, kiuj lastatempe perdis sian fidon je UEA, reveni al ĝi. Kelkaj tion faris. Pasis nun unu plia jaro. UEA ne pereis, Esperanto ne detruigis, la Movado ne disfalis, la Asocio ne politikiĝis, kaj la reputacio de Esperanto en la ekstera mondo certe ne malkreskis — eĉ male: en multaj lokoj ni gajnis novajn sukcesojn. Ni bezonas kritikadon: neniu homo estas perfekta, ankaŭ ne la gvidantoj de UEA. Sed ni bezonas intiligitan kritikadon, bazitan sur faktoj, racie argumentitan, firme prezentitan. Tamen la vojo de malkonsento ne estu turniĝo al la neesperantista gazetaro per fantaziaĵoj pri Esperanto kaj UEA, kiuj buntigas la paĝojn de nacilingvaj ĵurnaloj, sed antaŭenigas Esperanton eĉ ne unu centimetron. Tiu vojo estas sakstrato — kaj la pasintaj du jaroj pruvis ĝin sakstrato.

Malgraŭ tiuj ĉi makuletoj, la animstato de UEA, ĝiaj gvidantoj, ĝiaj programoj, estas escepte bonaj. Ni koncentras niajn energiojn je la ĉefa tasko: la konservado kaj plifortigo de la Esperantomovado kaj la efika prezento de Esperanto al la ekstera mondo. Kiam temas pri ĉi-lastaj, ni devas konstati, ke la mondaj cirkonstancoj subtile ŝanĝiĝis. La malnovaj argumentoj por Esperanto, kvankam ili multrilate retenas sian aktualecon, bezonas akriĝon, plivastigon; kaj necesas aldoni novajn. Jen unu el la kialoj malantaŭ nia nova serio de «Konsilaroj pri Esperanto-Agado» (el kiuj kvin aperis ĝis nun). Jen la kialo malantaŭ unu el la temoj de la nuna kongreso: «Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?»

Oni argumentas, ke la mondo bezonas Esperanton por forigi la nunan lingvan kaoson, ekzemple en internaciaj organizoj. La Monda Organizo pri Sano elspezos 12 milionojn da guldenoj por enkonduki la araban kaj ĉinan lingvojn — monon, kiun alikaze oni povus utiligi efektive por sanigi la homojn; Unesko en sia nova buĝeto antaŭvidas aldonon de preskaŭ 2 milionoj da guldenoj por plivastigi la utiligon de la araba kaj hispana; en la Eŭropa Komunumaro unu oficisto el kvar laboras en la lingvaj servoj. Kiel ia neregebla kreskaĵo en la internaciaj organizoj, la lingvaj servoj grandiĝas kaj ampleksiĝas. Samtempe la laborkapablo de tiuj organizoj ŝrumpas. Unesko ĉijare festas sian tridekan datrevenon. Ni gratulos ĝin je tiu okazo, sed ni ankaŭ jam atentigis al ĝi, ke Unesko ne solvis sian ling-



van problemon, ne sufiĉe okupiĝas pri la lingvaj problemoj ĝenerale.

Sed la kreskanta ekonomia kaj politika integriĝo de la mondo alportis improvizitajn solvojn al la lingva problemo. Dank' al vastega investo, la landoj de okcidenta Eŭropo kaj de pluraj aliaj mondopartoj sukcesis produkti konsiderindan nombron da homoj, kiuj parolas aŭ paroletas la anglan lingvon. Ili do kapablas komunikiĝi kun anglalingvanoj. Kvankam kiel konvinkitaj internaciistoj ni ĝojas, ke la diversaj nacioj interesiĝas pri la senpera komunikado de iliaj civitanoj kun tiuj de aliaj landoj, ni bedaŭras, ke tio ne okazas en spirito de reciprokeco. Tiu anglomanio rezultis almenaŭ parte el la simpla rifuzo de anglalingvanoj uzi aliajn lingvojn — kaj preteco de alinacianoj submetiĝi al tio. Kaj tio, karaj gekolegoj, estas klasika ekzemplo de lingva diskriminacio — eĉ se ĝi estas ne konata kiel tia flanke de la politikistoj, kiuj tiel fordonis la propran heredaĵon. Kiam ili fine komprenos, ke ekzistas alternativo — alternativo al tiu vasta investo, al tiu pozicio de malpli-valoro, al tiu submetiĝo al aliaj kulturaj valoroj? Tiu alternativo estas la Internacia Lingvo Esperanto. Ni daŭrigos nian atentigon al la registaroj kaj internaciaj organizoj pri la kostoj de la multlingveco kaj pri la alternativo, kiu jam ekzistas. Sed ni dediĉos multe pli da atento al aspektoj de la lingva diskriminacio. Ni estas firme konvinkitaj, ke la lingva problemo ne estas nur ekonomia problemo, sed ankaŭ morala demando. La trudado de la propraj valoroj al aliaj estas politike kaj morale neakceptebla. Tion rekonis lastatempe la loĝantoj de Soweto*, tion rekonas la kebekanoj, tion rekonas la usonaj parolantoj de la hispana.

Dum la venontaj monatoj UEA eldonos sian unuan dokumenton pri la lingva diskriminacio. Espereble, aliaj sekvos. La Centro de Esploro kaj Dokumentado dediĉos apartan atenton al la edukado de nia membraro pri la aspektoj de la lingva problemo. Samtempe UEA ortigos sian agadon ĉe internaciaj organizoj. Jam de jaroj ni agadas ĉe Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj, sed lastatempe fondiĝis laborgrupoj ĉe ambaŭ organizoj — pli laborkapablaj ol la unuopaj reprezentantoj, kiuj gvidis niajn aferojn tie antaŭe. Kaj aldoniĝas ankaŭ agado en Bruselo, ĉe la Eŭropa Komunumaro; en Tokio — ĉe la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, en Vaŝingtono, — ĉe la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj. Ligas kaj kunordigas tiun agadon la organiza aparato de UEA. Ni sistemigas nian informadon, eldonas dokumentojn, intervenas persone, kiam tio eblas. Dum la jaro 1976—77 ni povas antaŭvidi intensiĝon de tiu agado. La rezultoj ne venos rapide, ĉar la konvinkado de influaj homoj neniam estas

facila. Sed ili venos.

Parte ili dependas de efika agado en la unuopaj landoj. Ankaŭ tie la progreso estas kuraĝiga. La parlamenta agado, komence limigita nur al kelkaj landoj, nun vastiĝas. En pluraj landoj parolantoj de Esperanto aktive laboras en parlamentoj kaj partioj por havi efikon ĉe la lingva politiko en la koncernaj landoj kaj por antaŭenigi Esperanton. UEA mem kontribuas per konsilaroj, dokumentoj kaj novaĵleteroj. kiuj ligas la aktivulojn en la diversaj landoj.

La rezultoj dependas ankaŭ de sistemaj klopodoj konvinki la intelektulojn kaj universitalanojn en la diversaj landoj pri la fenomeno lingva diskriminacio kaj pri la bezono de internacia lingvo. Samtempe necesas ankaŭ influi la vastajn tavolojn de ordinaraj civitanoj pri la valoro de internacia komunikado — eĉ pri la rajto al tia komunikado per facile lernebla, neŭtrala rimedo, nome la Internacia Lingvo Esperanto.

Sed laboro ĉe naciaj registaroj kaj ĉe internaciaj institucioj ne igu nin neglekti tiujn personojn, kiuj ne tiel avantaĝe postenas kiel la diplomatoj kaj la internaciaj funkciuloj. Mi pensas unuavice pri la neregistaraj organizoj — do, organizoj kiel la nia, kiuj tamen uzas plurajn laborlingvojn. Ili dependas de maksimuma partopreno de la membroj, sed mankas al ili rimedoj por vere efikaj lingvaj servoj. Malmultaj el ili rekonas, ke la lingva problemo postulas ilian atenton: ili ne konscias entute, ke ĝi estas solvebla.

En tiu ĉi rapida trarigardo de niaj ĉefaj prioritatoj kaj la perspektivoj por la estonteco mi malmulton diris pri pluraj aliaj gravaj demandoj. Mi nenion diris pri niaj kongresoj. Ankaŭ ĉi-jare vi rimarkos ŝanĝojn en la kongreso kompare kun antaŭaj jaroj. Ili celas ĉefe ligi vin pli firme al la laboro de la Asocio — kaj ili dependas de via aktiva partopreno kaj via preteco demandi, kritiki, kontribui en la koncernaj kunvenoj. Mi diris nenion pri la junularo kaj pri nia espero, ke la ligoj inter TEJO kaj UEA fortiĝos dum la venonta jaro, kaj ke la vere gratulinda laboro de la junularo havos pli profundan efikon ĉe la ĝenerala Esperanto-movado.

Se ni frontas la venontan jaron pli fortaj, pli optimismaj, pli konvinkitaj ol antaŭ unu jaro, tion ni ŝuldas al du faktoroj — al la bona volo de nia membraro kaj al la sindona laboro de niaj aktivuloj. Tiu laboro ne sufiĉas — ĝi ne povos sufiĉi dum Esperanto ankoraŭ ne atingis ĝeneralan akceptiĝon. Sed, karaj gekolegoj, ĝi estas bona komenco. Ni havas devon, ni havas respondecon antaŭ la mondo proponi kaj sukcesigi nian solvon al tiu alimaniere nesolvebla problemo — la problemo de la lingvo. La vojo estos longa, sed ĝi estas inda kaj necesa vojo. Ni trovu forton ĝin sekvi.

* Legu «Soweto» — en Suda Afriko.



SOLA EN SUNSUBIRO

Se dum la sunsubiro
vin ekkaptas la sento de soleco
naskiĝas en la animo deziroj
pri io nekonata
aŭ konata aliel
sopiroj
pri la ripetigo de la pasinteco
sed pli bona

pli inda
pli profunda

por povi droni en ĝi
por ekscii ĉu jam estas fino
aŭ ĉu ne tute ankoraŭ
ĉu ankoraŭ ĉiam
havas valoron la samo
kio valoris iam

Tiuj espero kaj deziroj
orumitaj de la sunsubiro
forbrulas en ties orsangaj flamoj
kaj gravas nur tio
ĉu vi kapablas
post la lasta alrigardo
fermi la okulojn
kaj kapti la sunsubiron en ili
Se jes
povas veni la fino
ĉar vi portas malantaŭ viaj lidoj
la vivan bildon de viaj esperoj
brilantaj en la fajro de la renovigo
Subite vi eksentas
ke viaj sopiroj estas realeco
kaj ĝis la lasta momento
vi ripetas al vi:

Ĝi estas belega

Eduard Tvarožek

TRA LA
E★
MONDO

SEJToj MORTIS — VIVU SEJToj!

Pri tiu decido nia aktivularo pensis dum pluraj jaroj. Preskaŭ tuj post sia naskiĝo SEJToj fariĝis tiom popularaj, ke ili ne povis akcepti ĉiujn dezirantojn, kaj la dommastroj devis limigadi la nombrojn. Tamen ĉu tio estas bona eliro? Kial unuj esperantistoj havus la eblecon partopreni la tendarojn, kaj aliaj —

Poezio premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA

Dua premio

LA MANOJ DE L'HOMO

Mi aŭdis singultojn,
jubilojn de violono,
petolanta
en la manoj de homo.

Mi vidis miraklojn
de l'fora kosmo,
enigmon kaj solvon
en la manoj de homo.

Mi observis akvojn —
estis kvazaŭ fantomo —
ili iĝis urboj, floroj
en la manoj de homo.

Mi admiras la manojn de l'homo.

Mi vidis gevirojn
mortantajn pro malsato,
eĉ idojn iliajn.
Kadavrigadis ilin
kun penso trankvila,
en kvieto senzorga,
per manoj senmovaj —
homo.

Mi vidis korpojn
sen gambo, sen brako,
vizaĝojn sen vido.
Prirabis ilin
per longfingraj manoj siaj
homo.

Mi timas la manojn de l'homo.

Vesna Skaljer-Race

ne? Sekve, necesas okazigi somere ne unu, sed du, tri aŭ pli da tendaroj, por ke ĉiu deziranto ĝuu la fratecan atmosferon de esperantista junulara aranĝo.

Lige kun tio aperis samtempe alia demando: kiamaniere oni dividi la nun ekzistantajn tendarojn — ĉu laŭ regiona aparteno (okcidentaj kaj orientaj, ĉebaltaj kaj kaŭkaziaj), ĉu laŭ lingva nivelo de la partoprenantoj (komencantoj, progresantoj, aktivuloj), ĉu laŭ aliaj indikoj?

Finfine post longedaŭraj debatoj la X-a jubilea SEJM-Konferenco, kiu finiĝis antaŭ nelonge, akceptis la jenan decidon: ĉi-jare okazu la lasta SEJT-18 en Leningrada Regiono. Komenciĝante de la sekva jaro, SEJM zorgu pri organizo de du junularaj E-tendaroj, unu en Oriento (post la Uralaj montoj) dua en Okcidento (en la Eŭropa parto de Sovet



unio). Krome, ĉiujare, kiel ĝis nun, estu organizata SEJM-Konferenco de aktivuloj el la tuta lando. Ĉiun trian aŭ kvaran jaron SEJM okazigu pli grandan kaj multnombrian sian aranĝon, unuigantan ambaŭ tendarojn.

SEJToj mortis kiel SEJToj, sed aperis alia formo de la tendaroj. Ne gravas, kiel ili no-

miĝos, ĉu REJToj (regionaj E-Junulara tendaroj), ĉu aliel. Gravas, ke la sovetia E-junularo faris ankoraŭ unu paŝon antaŭen — al plivastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo de nia lando.

D. Cibulevskij

15-JARA JUBILEO DE „JUNECO“

La 10—11-an de julio la junulara E-klubo «Juneco» en Vilnius — USSR, festis sian 15-jaran jubileon. Tiukaze apud Vilnius la klubanoj organizis feston, kiun partoprenis gastoj el Kaunas, Klaipeda, Ŝiauliai, Tallinn, Doneck. Dum la festo la partoprenantoj konatiĝis kun la historio de la klubo, havis eblecon partopreni diversajn konkursojn, ripozis. Sonis E-kantoj, ludoj, funkciis foto-ekspozicio.

La klubo «Juneco» estas unu el la plej aktivaj kluboj en Sovetunio. Dum 15-jaroj, dank'al aktivuloj kiel R. Maŝalajte, M. Urbanaŭvičiute, G. Grabėjite, V. Bingelis, P. Jegorovas k. a., ĝi sukcesis fari sufiĉe grandan laboron. Laŭ iniciato de V. Ŝilas — multjara prezidanto de la klubo — kaj aliaj aktivuloj estis eldonitaj 3 E-kantaretoj, E-sondisko kun surskribo «Litova kanto en Esperanto», kies eldonkvanto atingis 5000, organizis la unuan tendaron por pioniroj-esperantistoj — Zita Verkulevičiute estis gvidantino de la taĉmento. Klubo «Juneco» organizis la unuan SEJT-on (Soveta E-Junulara Tendaro), kiu nun fariĝis tradicia kaj gravega por la junulara

E-movado en Sovetunio.

Ĉiujare la klubo organizas E-kursojn por gejunuloj. Dum 15 jaroj kursojn finis pli ol 300 gejunuloj. Multaj el ili fariĝis membroj de la klubo.

La klubo ĉiujare aranĝas kelkajn E-renkontiĝojn, kiujn partoprenas samideanoj el diversaj urboj kaj respublikoj de Sovetunio, arkaŭ eksterlandaj geamikoj. Tiuj aranĝoj jam fariĝis tradiciaj: renkonto de Nova Jaro, boata marŝo tra Ignolina-lagaro je la 1—2 de majo, literatura renkontiĝo «Muzo». Dezirantoj partopreni la lastan povas sendi materialon por diversaj konkursoj — de nova versaĵo, kanto, prozaĵo ktp. Membroj de «Juneco» partoprenas multnombrenajn aranĝojn organizitajn de aliaj kluboj, ankaŭ Baltan E-tendaron, Sovetian E-Junularan Tendaron ka. Kelkaj klubanoj vizitis Pollandon, Bulgarion, GDR, Hungarion. Tio multe helpas por perfektigo, por fari kontaktojn kun enlandaj kaj eksterlandaj amikoj, interŝanĝi spertojn pri E-agado ktp.

«Juneco» kore dankas ĉiujn amikojn, klubojn kaj rondetojn, kiuj sendis gratulojn okaze de ĝia 15-jariĝo.

Stasis Gajdamavičiū

LINGVAJ DEMANDOJ

Violin Oljanov

LA ARTO TRADUKI

I

Iuj opinias, ke la tradukado estas mekanika laboro. Oni rigardas la originalan tekston, serĉas la vortojn en la vortaro kaj faras frazojn. Komprenoble, tia opinio estas profunde erara. La tradukado prezentas malsimplan pensan, korean proceson. Ĝi estas fakte

rekreo de la originalo, el kiu ni tradukas, prezento de la materialo en nova formo. Antaŭ ol komenci traduki, oni devas enpenetri en ĉiun penson de la verko kaj transdoni ĝin en Esperanto (aŭ en la koncerna alia lingvo). Mi diris „ĉiun penson“ kaj ne „ĉiun frazon“. Oni devas adopti la



person kaj esprimi ĝin en la traduka lingvo ĝuste, kun pedanta precizeco. La frazon oni povas ne traduki precize, oni povas ellasi vorton, eĉ tutan esprimon, sed la senco devas esti absolute ĝusta, ekvivalenta al la originalo. Tiu celo necesigas, ke la pensoproceso pasu tra du etapoj: analizo de la penso kaj resintezo en la alia lingvo. Por ke tiuj du etapoj estu plenumitaj korekte, oni devas scii la tutan verkon, la bazajn ideojn de la aŭtoro, ties lingvan materialon, la ecojn de lia stilo. Sen tiu kono oni ne povas fari veran analizon, des pli — traŝan sintezon. Tiu anticipa postulo — la kono de la tuta verko, estas nepre necesa ĉe tradukado de belarta verko, samkiel de publicistika kaj ĵurnalistika.

Traduki signifas esprimi ĝuste kaj komplete per la rimedoj de iu ajn lingvo tion, kio jam estas esprimita per la rimedoj de alia lingvo en nerompebla unueco de enhavo kaj formo.

Se ni malfermus la vortaron, ni konstatus, ke por la plimulto da vortoj estas donitaj kelkaj proponoj por traduko. Ni devas elekti la plej ĝustan por la kazo, por la konkreta teksto, por la penso de la aŭtoro. Sed eblas okazi, ke ni povas elekti eĉ ne unu el la proponitaj variantoj, kaj ni devas verki pli precizan por la okazo vorton aŭ esprimon.

Ekzemple ni traduku la bulgaran frazon: „Имат право да гласуват само отчетените членове.“ Ni malfermas la vortaron bulgaran-esperantan de Atanas D. Atanasov k. a. kaj serĉas la vorton „отчетен“. Ni vidas, ke ĝi estas donita dufoje, do la aŭtoroj rekonas por ĝi plurajn signifojn. Kiuj estas ili? Ni legas: „raporta, priraporta; konfesita, rekonita“. La nesufiĉe sperta esperantisto fidus absolute al la vortaroj kaj kuraĝe tradukas: „Havas rajton voĉdoni nur la konfesitaj membroj“ aŭ eble „raportitaj membroj“. Sed kiun ajn el la proponitaj tradukoj ili elektu, la frazo estus ne nur neĝusta, sed ridinda. Do, la

ĝusta traduko ne estas donita en la vortaro: „Nur la kotizintaj membroj rajtas voĉdoni“. Aŭ ni okupiĝu pri alia signifo de la bulgara vorto „отчетен“: „Председателят прочете отчетния доклад“. Ĉu ni povas akcepti iun el la donitaj tradukoj? „Raporta raporto“ evidente ni ne povas diri; „konfesita“ aŭ „rekonita“ — ankaŭ. En tiu okazo ni povus diri: „La prezidanto tralegis la agadraporton“ (aŭ „la priagadan raporton“). Sed ankaŭ tiu ĉi signifo de la bulgara vorto „отчетен“ mankas en tiu plej granda kaj laŭ mi plej aŭtoritata bulgara-esperanta vortaro.

La bulgaran frazon „Той се разсмя гръмко“ ni povus traduki laŭ kelkaj manieroj: „Li ekridegis“, „Li ekridis tondre“, „Li ekridis forte“, „Li ektondris per rido“. Vi vidas, ke ni ne tenas nin blinde je la vortoj, sed la penso de la aŭtoro estas ĝuste dirita en Esperanto. Kiun el la kvar variantoj ni elektos, dependas de la kunteksto, de la karakterizo de la aganta persono, priskribita en la verko, de la stilo de la aŭtoro.

Ni prenu la francan esprimon: „Faites attention!“ Ĉu ni devas traduki ĝin: „Faru atenton!“ Evidente ne! Tio estus kripligita Esperanto. Ni devas traduki ĝin simple: „Atentu!“ Kvankam ni ne tradukas ĉiun vorton, ni tamen tre ĝuste transdonas la sencon, sen ia ajn nuanca diferenco.

Kiam mi donas traduktaskon al la kursanoj, oni min demandas, ĉu ĝusta aŭ laŭvorta traduko. Mi respondas: en bonan Esperanton (aŭ bulgaran, aŭ kiun ajn alian lingvon) faru ĝustan, sed ne laŭvortan tradukon. Oni ofte miksas la nociojn „ĝusta“ kaj „laŭvorta“ traduko. Ili estas poluse diversaj. Plej ofte laŭvorta traduko estas malĝusta. Ni devas ĝuste transdoni la aŭtorajn pensojn en bona lingvaĵo. Tio postulas, ke la tradukanto konu same perfekte la lingvon, el kiu li tradukas, kaj la lingvon, en kiun li tradukas. Ne malmulte da bulgaroj ne konas perfekte la bulgaran, do ili ne povas bone traduki en la bulgaran



lingvon, precipe belartan aŭ publicistikan verkon. Tio rilatas al ĉiu ajn lingvo, ankaŭ al Esperanto.

II

En la diversaj lingvoj ne ĉiam ekzistas paralelaj vortoj kaj esprimoj. Ekzemple la bulgaraj vortoj tarator, bamja, teljak, nestinarka, survakari, koledari, la plimulto de kulinaraĵoj nomoj ktp. ne havas ekvivalentojn en multaj lingvoj. La angla farmisto havas apartajn vortojn pri unujara ŝafo, pri dujara tondita ŝafo. Multajn vortojn por esprimi la diversajn specojn de ŝafoj havas la ŝafistoj de Dalmatio. Certe ankaŭ niaj ŝafistoj kaj aliaj vilaĝanoj havas multajn nuancvortojn por esprimi aĵojn, agojn kaj ecojn, kun kiuj ili konfrontiĝas ĉiutage kaj kiujn la urbanoj eĉ de la sama nacio ne konas. La italoj havas la vorton „intaskare“, kiu en multajn lingvojn estas netradukebla. Oni tradukas ĝin per la frazo „meti en la poŝon“. Sed tiu frazo ne kongruas la esprimon „intaskare“, ne posedas ĝian nuankoloron. En Esperanto ni havas ekvivalentan esprimon „enpoŝigi“.

En Esperanto ekzistas multaj vortoj, por kiuj estas malfacile trovi ekvivalentojn en la naciaj lingvoj. Tiaj estas multaj el la verboj, kunmetitaj el prepozicio kaj substantivo, vortoj, formitaj el sufiksoj, ktp.: surtabligi, alborigi, elpoŝigi, enŝrankigi, enkorpiĝi, ecaro, ulo, vivo kaj multaj aliaj.

Kiel la bulgaroj tradukas la E-vortojn „aligilo“ kaj „aligi“? Ofte vi aŭdos: „Алиджира ли се за конгреса? Аз изпратих алиджиро.“ Tia kripligo de la gepatra lingvo montras malriĉan lingvan kulturon, mankon de strebo al ĝusta esprimado. Oni devas ĉiam serĉi la plej trafan esprimon en la koncerna lingvo. En ĉiu lingvo ni devas esprimi nian penson korekte, kaj neniumaniere enŝovi elementojn de unu lingvo en alian. En la menciita ekzemplo ni devas diri en bulgara lingvo: „Записа ли се (присъедини ли се) за

конгреса? Аз изпратих заявка (формуляр) за участие.“

Ni scias, ke la E-vortfarado estas tre fekunda. Tio estas unu el la geniaj eltrovaĵoj de Zamenhof, kiu faris Esperanton konkurkapabla kontraŭ la aliaj lingvoj, pretendantaj ludi la rolon de internaciaj. Per tiu riĉeco Esperanto superas la plimulton de la naciaj lingvoj. Nome pro tio multaj E-vortoj kaj esprimoj estas malfacile tradukeblaj en naciajn lingvojn.

En Esperanto el ĉiu substantivo kaj adjektivo oni povas fari verbojn. La verbo „reĝi“ estas sinonimo de la frazo „Estas reĝo“. Ekzistas tamen nuancdiferenco. La esprimo estas pli dinamika — agas kiel reĝo (li povas ne esti reĝo), la dua estas konstata. Same: profesori, advokati, filozofi, idioti... „Li ĉiam profesoras“ ne estas tute egala al „Li estas profesoro“. „Li filozofas“ ne estas tute egala al „Li estas filozofo“. „Ili idiotas“ ne signifas, ke ili nepre estas idiotoj. Aŭ la verboj blanki, ruĝi, verdi, majesti... La papero estas blanka, sed la supro blankas (impresas blanke). La robo estas ruĝa, sed oriento ruĝas, la manifestacio estis majesta, sed la naturo majestis en sia multkolora vesto. En ĉiuj ĉi ekzemploj la verbo estas pli vigla, pli bildeca, pli impresa ol la adjektivo

III

Kiam ni diras, ke ni devas vesti la tradukitajn pensojn en bonan lingvaĵon, ni konsideras ne nur la ĝustan uzon de la vortoj, ne nur la pedantan aplikon de la gramatikaj reguloj, sed ankaŭ la spiriton de la lingvo, ĝian stilon, la strukturon de la frazo. Ni ne devas forgesi, ke Zamenhof kreis Esperanton kiel lingvon de la popolamasoj, kaj pro tio la simpleco kaj la facileco de tiu lingvo estiĝis unuj el ĝiaj bazaj kvalitoj, kiuj avantaĝigis ĝin kontraŭ la ceteraj pretendantoj je internacia rekono. Sed ekzistas personoj, kiuj nepre deziras komplikigi ĝin. Ili rubigas ĝin per novaj vortoj, novaj afiksoj, malsimpligas eĉ la gra-

matikon. Mi ne estas absoluta kontraŭulo de la neoficialaj vortoj. Ofte ni ne povas bone esprimi nian penson nur per vortoj oficialaj, agnoskitaj de la Akademio de Esperanto. La natura evoluo de ĉiuj lingvoj necesigas konstantan pliriĉigon per novaj vortoj. Sed ekzistas nenecesaj vortoj, por kies signifo estas sufiĉe bonaj vortoj en Esperanto kaj kiujn oni senpripense prenas el iuj lingvoj kaj kontrabande enŝovas en Esperanton. Iu esperantisto demandis min, ĉu ekzistas Esperanta vorto „neksta“. Kompreneble, mi respondis nee. „Sed mi renkontis ĝin en presaĵo“ — insistis la samideno. „Bedaŭrinde, — respondis mi, — eĉ gazetojn redaktas kaj librojn verkas malbonaj esperantistoj. Kial estas necesa al ni „neksta“, se ekzistas sufiĉe bonaj E-vortoj pri la sama nocio: „sekva“, „estonta“? Aŭ la tiel nomataj novaj afiksoj, kiuj jam plurajn jardekojn estas novaj, ĉar ili ne estas akceptataj de la esperantistaro? Ĉu estas necesa labirinto da reguloj pri la uzo de la komo? Ĉu ne sufiĉas diri, ke oni metas komon, kie estas necese por ne esti miskomprenon aŭ neklaran penson? Kion ni diru pri la multaj reguloj por transliniigo de la vortoj? Kelkaj aŭtoroj kvazaŭ konkuras, kiu kreus pli komplikan kaj malfacilan regularon por tio. Zamenhof diris simple: „... la transportado de la vortoj estas pure papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividis ekzemple „aparteni-s“, ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.“ (L. L. Zamenhof, „Lingvaj respondoj“, VI eldono, 1962, p. 57). Ne estas necese aldoni ion ajn al la klara kaj logika respondo de Zamenhof. Kompreneble, ankaŭ ĉe tiu okazo ni devas eviti miskomprenigajn dividojn (ekzemple de cifero, ĉar oni povas akcepti la du

partojn kiel du diversajn ciferojn).

Pri la strukturo de la frazo. Oni ordinare konsilas, ke la vortordo estu la jena: subjekto, predikato, objekto, adjekto (cirkonstanca komplemento). Sed tio estas nur baza strukturo, por kies rompo aperas konstante kaŭzoj. Kompreneble, ni ne devas kateni la lingvon, farante ĝin tiamaniere monotona kaj teda. Ekzemple, estas forte ligitaj la subjekto kaj la predikato kaj ili ofte sekvas unu post la alia: „Ni vizitas la kunvenojn ĉiumerkrede“, „Ili babiladis longe“. Sed ofte ni intermetas adverban adjekton, ĉar ĝi ankaŭ rilatas al la verbo kaj precipe, se ni deziras ĝin substreki: „Ni regule vizitas la kunvenojn“, „Ili longe babiladis“. Ofte ni ŝanĝas la ordinaran lokon de vorto, kiun ni deziras emfazi: „Babiladis ili longe kaj ne laboris“.

Jen ekzemploj de frazoj, ĉe kies traduko ŝanĝiĝas la vortordo:

От Златните пясъци и Слънчев бряг през месец септември тръгват групи за участие в гроздобер по маршрута Преслав — Варна =

En septembro grupoj ekveturas de Zlatni Pjasaci kaj Slânĉev Brjag sur la vojo Preslav — Varna por partopreni vinberrikoltadon.

Чрез Министерството на просвета-та на двуседмична почивка ще пристигнат младежки и ученически групи от ГФР =

Gejunulaj kaj gelernantaj grupoj el FRG alvenos per la Ministerio de la Klerigo por dusemajna ferio.

От началото на годината досега са обслужени над 200 души, а до края на декември техният брой се очаква да се увеличи с още 250 души =

Pli ol 200 personoj estas priservitaj de la komenco de la jaro ĝis nun. Oni esperas, ke ĝis la fino de decembro ties nombro plikreskos per kromaj 250 personoj.

En la traduko de la lasta frazo ne nur estas ŝanĝita la vortordo, sed el unu frazo estas faritaj du. Mi atentigas ankaŭ pri la traduko de la espr-



Verdaj ŝteloj

Ljudmila Jevsejeva

MARISTO

Sur lageto — ligna flos',
kaj sur ĝi — maristo.
Certe, li imagas sin
brava mar-rabisto.
Inter rifoj, tra nebul',
flos' direktas kuron.
La maristo per okul',
serĉas lumo-turon.
Ve, aŭdiĝas ĵviku-ĵvak:
renversigas flosa.
Palvizaĝa mar-rabist'
krias «SOS!» kaj «SOS-o-o-o!»
«En mallum' sablaĵon mi
ne rimarkis tute,
kaj rezulte en laget',
sidas ĝiskubute.
Ŝlimkovrita aĉas tre
mia uniformo.
Kion diri al patrin' ?
— Min atakis ŝtormo!

LA MALDILIGENTA EDZINO

Latva popola fabelo

Iam vivis tre maldiligenta edzino, kiu eĉ la propran ĉemizon ne lavis. Foje ŝia edzo estis revenanta hejmen kun io blanka subbrake. Vidinte lin de malproksime la edzino decidis, ke li kunportas novajn ĉemizojn, kaj tuj ĵetis en la fajron la malnovajn, karbonigrajn ĉemizojn.

La edzo revenis hejmen, sed subbrake li portis blankan anseron. La edzino ege ĉagreniĝis, ĉar la ĉemizoj estis jam bruligitaj. Kion nun fari sen ĉemizoj? La edzo ege koleriĝis pri la edzina ago, sed nenion povis fari. Finfine li tamen aĉetis novajn ĉemizojn. Sed la edzino fariĝis pri diligenta kaj jam estis same pura kiel la aliaj homoj.

El la latva: *Saulcerite Neilande*



NEKROLOGOJ

Tute subite la 18-an de aŭgusto en Sofio forpasis la arda esperantisto kaj komunisto

Ivan Dobrev

Jam junulo li ellernis Esperanton en u. Karlovo kaj tutan vivon estis fidela al ĝi, uzis ĝin praktike por vastaj internaciaj kontaktoj, laboris fervore por ĝia disvastigo.

Sed la plej grava estis tio, ke Dobrev majstre aplikis Esperanton por literaturaj celoj. Jam 21-jara en 1921 li tradukis la faman versaĵon „Mia preĝo“ de nia genia poeto-revoluciulo Ĥristo Botev. Sekvis kelkaj aliaj tradukoj kaj en 1928 j. la tuta poezia verkaro de Botev aperis libroforme en traduko de Ivan Dobrev.

En Esperanton Dobrev tradukis multe — el Ĥristo Smirnenski, Nikola Vapcarov, Mladen Icaev, Vselin Ĥarcev, Orlin Orlinov ka. Lia tradukarto estis majstra, altnivela.

La loko de Ivan Dobrev en niaj E-vicoj atente maplenas.

Forpasis arkaŭ

Damjan Kruŝev

en u. Telbuĥ'n, 40 jarojn de sia vivo li kiel esperantisto kaj komunisto laboris entuziasme por la klerigo de la popolo. Ekskluzive labo-

rema, sindona kaj modesta, Kruŝev altkonscie plenumis sian devon kiel instruisto, inspektoro, aganto de BEA kaj Patrolanda Fronto.

Riverencon antaŭ la memoro de niaj kara forpasintoj!

deziras korespondi

Bulgario

Angelina Ĥr. Japargieva — „Orfej“ — 3, vĥod III, ap. 37, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Danka Marinova Jankova — ul. Timok 87, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Ilijana Jankova Ilieva — „Orfej“ — 2, vĥod II, ap. 44, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Mara Kostova Vasileva — ul. Partizanska 80, vĥod III, ar. 39, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Nikolaj Atanasov Nestorov — ul. Partizanska 78, vĥod II, ap. 12, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernanto — bk, pm, insignoj).

Slavejka Dimitrova — ul. Partizanska 80, vĥod A, ap. 27, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Tonka Iv. Stojanova — ul. Partizanska 78, vĥ. A, ap. 9, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Petronka Pileva Văłkanova — ul. Georgi Ĥirkov 90, vĥod 3, ap. 19, 6300 *Ĥaskovo* (13-jara lernantino — bk, pm, insignoj).

Instruistinoj dez. korespondi tutmonde pri ĉt. Komuna adreso: Uĉiliŝte „Georgi Dimitrov“, S. Tareva — uĉitelka, *Targoviŝte*.

Maria Iv. Djankova — ul. Napoja 9, 7100 *Bjala* (presistino — kun ĉl pri ĉt).

Ivan P. Severnjaŝki — ul. Benkovski 17, 7100 *Bjala* (presisto — kun ĉl pri ĉt).

Ivan G. Vărbanov, ul. Dragoman 7, 7100 *Bjala* (presisto — kun ĉl pri ĉt).

Danka Anđelova Krăsteva — ul. Benkovski 28, 7100 *Bjala* (presistino — kun ĉl pri ĉt).

Galja Markova — ul. Avrora 31, 7800 *Po-povo* (lernantino — kun ĉl pri ĉt).

Angel Prokopov Ŝiŝev — 2830 *Katunci*, Blagoevgradsko (27-jara horloĝisto — kun ĉl pri ĉt).

Ĉeĥoslovakio

Junaj esperantistoj dez. korespondi kun ĉl pri ĉt. Komuna adreso: E-rondo SZK Rostex Viŝkov apud *Brno*, str. Havliĉkova.

Pollando

Stanislav Wolosz — 07-421 *Olszewka*, voj. Ostvolska (25-jara — pri literaturo, foto, Esperanto, bk, pm, moneroj).

Jolanta Seweryn — *Krapkowice* 3, ul. Krasickiego 5/83, 47-303 Pollando (18-jara — kun bulgaraj esp-toj pri kino, muziko, teatro, sporto, Esperanto).

Zofia Plichta — 80-227 Gdansk — *Wrzeszcz*, ul. Hibnera 34 (20-jara — sporto, turismo, perspektaj, bk).

Agneska Talarcyk — ul. Kurpiskiego 2, 64-100 *Leszno* (19-jara — sporto, muziko, filmoj, bk).

Tereza Biećrava — 32-410 *Dobřice*, ul. Rinek 32, voj. Krakovo (15-jara — Esperanto, teatro, kiro).

Ewa Szimanska — ul. Sulkowskiego 46/24, 85-642 *Bydgoszcz* (21-jara — bk, muziko, filmoj).

Tadeusz Figurski — Zeromskiego 3, 05-120 *Legionowo* (13-jara — historio, sporto, filatelo ktp).

Beata Bieniek — Przemyslow 4, 99-441 *Złakow Koscielny*, voj. Skierniewice (kun gejunuloj pri naturo, muziko, foto, teatro).

Stanislawa Topa — 53-307 *Wroclaw*, ul. Kamienna 35/37, DS „Przegulowiec“ (21-jara — studentino — kun ĉi pri literaturo, moderna muziko, sporto, turismo, bk, mod. revuoj, gram. diskoj).

Edvard Drozd — ul. Orzeszkowej 9 e/11, 83-110 *Tcew* (14-jara — kun samaĝuloj).

Barbara Czepiel — ul. Barska 57/3, 30-307 *Krakow* (16-jara).

Sovetunio

Belajeva Anna Markovna — 720 064 *Frunze* — 64, 3 mikrorajono 18-20 (23-jara instruistino en muziklernejo — kun ĉl pri ĉt).

Vilius Rauduė — Pasvalio raj., *Daujenu p-tas*, Girsudu km, Litovio (22-jara — kun junuloj pri muziko, naturo, studenta vivo).

Vilhelmas Randus — 233018, *Kaunas* — 18, Vistycio 20, Litovio (18-jara — kun ĉl pri ĉt).

Eugenia Riburieve — N. *Vilnia*, Gerovs 9-38, Litovio (25-jara flegistino — kun ĉl).

Esperanto-ronĉo, — ul. Barrikad 126-4, *Kaluga* — 16 (kun ĉl pri ĉt).

Kaŝicina Larisa — *Ivanovo* — 14, domo 200 kv., 43 (lernantino en la 8 klaso — kun geknaboj tutmonde).

Lebedeva Ira — *Ivanovo* — 24, ul. Kalaŝnikova, dom 56, kv. 2 (en la 8 klaso — kun ĉl).

Leo Teder — Nomme Sovhoos, 203 622 *Kilingi* — Nomme, Estonio (bk kaj pm je temoj pri floroj, faŭno, sporto, pentraĵoj, kosmo).

Hmeljova Nina — 617070 *Krasnokamsk*, ul. Ĉapaev 55-49 (19-jara — kun ĉl pri ĉt).

Mamleeva Rajla Ŝĉakirovna — Sovetunio 614052, *Perm*, ul. Kalinina d. 29-10 (mezaĝa advokatinino — kun ĉl pri ĉt).

Puzirjova Ljuba — *Omsk* — 644030, ul. Sportivnaja dom 19 (studentino de juro — pri literaturo, juro kun Pollando, GDR, FRG).

Raja Zaharĉenko — *Omsk* 644063, ul. 20 let RKKA, dom 246, kv. 4 (studentino de juro — kun ĉl — pm, insignoj, poŝkalendaretoj, steno-grafio, muziko, turismo).

Serĝo Kostin — *Omsk* — 644020, ul. Irtiŝskaja nabereĝnaja 48, kv. 112, (studento de juro — kun ĉl pri ĉt).

